der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde im Kulturbund der DDR

13. Jahrgang | Nr. 85 (5/1977) | 30 Pf

Okaze de la 60-a jubileo de la Granda Socialisma Oktobra Revolucio

Georgi Korotkeviĉ, Moskvo

Naskita sub la signo de la Dekreto de Lenin

2—a parto

Parolante hodiaŭ pri la lukto por stabila paco, kiu estis kaj estas „alfa kaj omega" de la ekstera politiko de Soveta lando, oni mense kontinuigas la fadenon inter la unua Lenina dekreto de 1917 kaj la pacaj programoj de la 24-a kaj 25-a Kongresoj de Komunista Partio de Soveta Unio. Dank' al la senlaca lukto por stabiligo de paco, kiun daŭrigas la Lando de la Granda Oktobro kaj la tuta interamika socialisma landaro, ricevante subtenon de tutmondaj pacamaj fortoj, oni povas konstati signifoplenajn rezultojn. Oni klare vidas hodiaŭ tendencojn de venka progreso en reala malstreĉiĝo, de la internacia tensio.

Kio estas malstreĉiĝo, kion jam ĝi donis kaj donas al popoloj de la mondo, tre klare kaj elĉerpmaniere determinis la Ĝenerala Sekretario de Centra Komitato de Komunista Partio de Soveta Unio, Leonid Breĵnev en sia parolado en Tula la 18an de januaro. Li diris: „Malstreĉiĝo — tio estas preteco solvi malakordojn kaj disputojn ne per forto, ne per minaco kaj tintego de armiloj, sed per pacaj rimedoj, ĉe la tablo de intertraktoj. Malstreĉiĝo — ĝi estas certa konfido kaj scipovo observi kaj atenti la leĝajn interesojn de unu fare de la alia. La vivo montris, ke dum mallonga periodo eblas rimarkeble ŝanĝi la etoson de la internaciaj interrilatoj. La kontaktoj inter la landoj en politika, ekonomia kaj kultura sferoj larĝiĝis. Sed la plej grava rezulto estas, ke la danĝero de nova granda milito forŝoviĝis. La homoj ekspiris pli libere kaj nun plu kun granda espero rigardas la estontecon".

Kiel konstatas ĉiuj pacamaj fortoj, hodiaŭ jam estas kreitaj ĉiuj premisoj por fari malstreĉiĝon nereturnigebla.

Multajn jarojn Soveta Unio luktis kune kun aliaj socialismaj landoj kaj ĉiuj vere pacamaj fortoj por stabiligo de paco sur la Eŭropa kontinento, kie dufoje dum unu jarcento komenciĝis mondmilitoj.

Multe da energio kaj fortostreĉoj al Soveta Unio kaj ĉiuj veraj amikoj de paco kostis la certigo kaj konvinko de ĉiuj regantoj kaj progresemaj politikaj agantoj, ke estas urĝe necese ellabori sistemon de kolektiva sekureco sur la Eŭropa kontinento, stabiligi la atmosferon de reciproka kompreno kaj amikeco. Tiu longa kaj malfacila laboro donis bonajn fruktojn: la kunvokon kaj sukcesplenan laboron de la Tuteŭropa Konferenco por Eŭropa Sekureco kaj Kunlaboro. La decidoj de la Tuteŭropa

Konferenco, formulitaj en la Fina Akto, la agnosko de stabileco de nuntempaj limoj, la kunlaboro en la kondiĉoj de reciproka estimo kaj neinterveno en internajn aferojn — tio estas konstruiva dokumento de reala paco, kiu malfermas perspektivojn de evoluo de bonnajbaraj, amikecaj rilatoj inter ĉiuj popoloj de Eŭropo. Sur stabila bazo de tiuj decidoj evoluas sukcesplene reciproke utilaj, grandskalaj, longdaŭraj ekonomiaj, sciencaj kaj kulturaj interrilatoj, interkonsentoj inter ŝtatoj. Antaŭ nelonge la socialismaj landoj, membroj de la Organizaĵo de Varsovia Pakto, dum la kunsido de la Politika Konsulta Konsilantaro en Bukareŝto proklamis novajn pacajn proponojn. Ilia enhavo estas: ĉiu lando, kiu partoprenis la Tuteŭropan Konferencon por Eŭropa Sekureco kaj Kunlaboro kaj subskribis la Finan Akton, prenu devontigojn ne apliki kiel la unua nuklean armilon unu kontraŭ la alia.

En la fino de la pasinta 1976-a jaro, la tuta mondo estis atestanto de novaj pacaj iniciativoj de la Lando de la Granda Oktobro. Dum la 31-a sesio de Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj la sovetaj reprezentantoj prezentis kelkajn gravajn proponojn, direktitaj al la plua firmigo de la paco en la tuta mondo — la proponojn, kiuj konformas al la deziroj de ĉiuj homoj en ĉiuj landoj.

Tiuj proponoj estas:

- decidi tutmondan pakton pri rifuzo de forto en la rilatoj inter ŝtatoj;
- decidi konvencion pri malpermeso de milita aŭ ia alia malamikeca utiligo de rimedoj por influado al la natura medio;
- kunvoki tutmondan konferencon pri problemoj de malarmado kaj specialan malarmadan sesion de la Ĝenerala Asembleo;
- nuklea malarmado kaj ĉesigo de eksperimentaj eksplodoj de nukleaj armiloj.

La rezultoj de la sesio donas novan impulson al la procedo de la saniĝo de la internacia klimato. Pacamaj konstrukreaj proponoj de Soveta Unio alvokis vastan reehon en la tuta mondo kaj trovis varmegan subtenon en la Unuiĝintaj Nacioj.

Cent milionoj da sovetaj civitanoj, da civitanoj de Germana Demokratia Respubliko, de Hungara Popola Respubliko, de Pola Popola Respubliko kaj aliaj socialismaj landoj subskribis la novan Stockholman Alvokon pri ĉesigo de vetarmado. Denove kaj denove Soveta Unio proponas al la plej granda kapitalisma lando Usono, decidi interkonsenton pri la limigo de strategiaj armadoj sur la bazo de la interkonsentoj, atingitaj en Vladivostoko en la jaro 1974. Ankaŭ aliaj gravaj problemoj de malarmado, de la redukto de milita danĝero atendas sian solvon.

La konsekvenca lukto de Sovetunio por paco kaj sekureco, por interkompreno kaj amikeco de la popoloj, trovas profundan kunsenton en la tuta mondo; ĉiuj homoj de bona volo en ĉiuj ŝtatoj vidas en tiu senlaca lukto esprimon de iliaj propraj streboj. Sed, kiel montras la vivo, ĉiu nobla kaj humanisma iniciato havas en la okcidentaj landoj ne nur amikojn, sed ankaŭ malamikojn, inter la lastaj — reprezentantojn de tiuj rondoj, kiuj deziras daŭrigi la vetarmadon, kiuj estas kontraŭ malstreĉiĝo de la internacia tensio. Unu el la disvastigitaj iliaj „argumentoj" kontraŭ la paco kaj malarmado estas la mito pri la „soveta minaco".

La tuta historio de la soveta ŝtato, tuta ĝia vivo kaj laboro en ĉiuj sferoj de la homa agado montras al la tuta mondo, ke dum la 60 jaroj de sia ekzisto la Lando de Granda Oktobro neniam kaj al neniu minacis. Kaj se oni komparas la alineon de militaj elspezoj en la ŝtataj buĝetoj de Sovetio kaj de la landoj, el kiuj estas disaŭdigata la ĉikano pri „soveta minaco", la bildo estas jena:

– la militaj buĝetoj de landoj, kiuj apartenas al Nordatlantika Milita Pakto (NATO), ĉiujare plialtiĝas; nur en la jaro 1975 la militaj buĝetoj de eŭropaj nordatlantikaj ŝtatoj plialtiĝas (kompare kun la pasinta 1974-a) je 5,5 miliardoj da dolaroj kaj en la nuna financa jaro la milita buĝeto de Usono atingis la rekordan nivelon: 113 miliardoj da dolaroj.
Soveto reduktis la militajn elspezojn por la jaro 1977 je 200 mireduktis siajn militajn elspezojn, ekzemple la lasta sesio de Supera Soveto reduktis la militajn elspezojn por la jaro 1977-a je 200 milionoj da rubloj.

La tutmonda agnosko de la grava rolo de Sovetunio en la lukto por paco trovas ankaŭ sian esprimon en la fakto, ke Moskvo – ĉefurbo de Sovetio – ofte estas loko, kie oni organizas gravajn internaciajn renkontojn de pacbatalantoj, kie. oni pridiskutas kaj akceptas gravajn decidojn pri la plimultigo de strečoj de ĉiuj bonvolemaj homoj de ĉiuj landoj por lukto por la paco, reciproka kompreno kaj amikeco.

Ĉiuj amikoj de la paco por ĉiam memoros la Tutmondan Kongreson de Pacamaj Fortoj, kiu kunsidis en Moskvo antaŭ pli ol tri jaroj kaj fariĝis grava vojsigno en la tutmonda pacmovado. Kaj antaŭnelonge – dum januaro de la nuna jaro – la Soveta ĉefurbo fariĝis loko de nova, la plej reprezenta tutmonda renkonto de pacaj batalantoj, la Tutmonda Forumo de Pacamaj Fortoj. En ĝia laboro partoprenis pli ol 70 internaciaj kaj 220 naciaj organizaĵoj el pli ol 120 landoj, inter la partoprenintoj ankaŭ Mondpaca Esperantista Movado (MEM).

Kun granda vervo la ĉeestintoj renkontis la salutmesaĝon de Leonid I. Breĵnev, kiu skribis:

„Nia partio, la soveta popolo, kune kun ĉiuj popoloj de la mondo luktas kaj senlace luktos por tio, ke ne amasiĝu plu novaj kaj novaj montoj da armilaro. Ĝi luktas por sekureco de plena egalrajteco kaj sendependeco de la popoloj, por abolo de kolonialismaj kaj rasismaj fajruĵoj, kontraŭ uzo de diktado kaj ekspluatado en internaciaj rilatoj.

La plej grava tasko hodiaŭ estas agi kaj trovi saĝajn decidojn, kiuj malfermu la vojon al pli rapida, senprokrasta, reala malarmado kaj materializado de malstreĉiĝo, por transformi ĝin en realan nereturneblan procedon. Por tiaj taskoj povus multe fari politikaj partioj, profesiaj sindikatoj, virinaj kaj junularaj organizaĵoj, parlamentanoj, scienculoj kaj kulturaj agantoj – ĉiuj pacamaj fortoj de la socio – aktivaj partoprenantoj en la lukto kontraŭ minaco de nova monda konflikto, konstruantoj de stabila paco kaj fidinda sekureco. Oni povas sen troigo diri, ke tamen pro la agado de tiuj fortoj hodiaŭ estas malfermitaj novaj, pli larĝaj perspektivoj. Pri la certa decidemo de la popoloj, plifortigi la pacon atestas la tutmonda kampanjo por subteno de nova Stockholma Alvoko lukti kontraŭ vetarmado, kiun subskribis pli ol 400 milionoj da homoj.

Estas tre grave, ke sociaj fortoj, popolaj amasoj ankaŭ en estonteco tenu la manon sur la pulso de la mondeventoj, donante ĝustatempan rebaton al militistoj, imperiismaj fortoj, kiuj laŭ propreprofitaj celoj estus pretaj atenci kontraŭ la paca estonteco de homaro.“

En tiu ĉi Tutmonda Forumo estis pridiskutitaj gravaj problemoj de la plifirmigo de malstreĉiĝo, de lukto por malpermesi armilojn de amasa ekstermo de homoj, problemoj de malarmado, de pligraviĝo de pacama publika opinio en internacia politiko kaj aliaj. Multaj oratoroj kaj partoprenintoj substrekis, ke tiu ĉi grava renkonto de la pacaj batalantoj en Moskvo okazis en la jaro, kiam la Soveta Lando kaj la tuta pro-

Memorlibro pri falintaj esperantistoj 1941 — 1945

111 paĝoj — formato 14 × 20 cm plus 16 paĝoj kun fotoj de esperantistaj popolaj herooj — Zagreb 1977. Eldonis Kroatia Esperanto Ligo laŭ komisio de Jugoslavia Esperanto Ligo.

Jen libro kiu meritas ne nur vastan disvastigon, sed ĝi instigu ankaŭ aliajn landajn organizojn al simila grava historia laboro, utila por la prestiĝo de Esperanto en la koncernaj landoj.

Post diligenta laboro la jugoslaviaj esperantistoj nun povas dokumenti per la libro la nomojn de 340 falintoj kaj pereintoj el 90 diversaj lokoj de Jugoslavio, inter ili 37 popolaj herooj.

Tio signifas, ke la tiam relative malforta Esperanto-movado en Jugoslavio perdiŝ ĉiun trian organizitan esperantiston kaj ĉiu deka falinto estas distingita popola heroo.

La libro enhavas biografiojn de preskaŭ ĉiu falinto, kiuj montras, ke multaj el la plej aktivaj esperantistoj falis en la jaroj 1941 — 1945.

Tamen la libro nur dokumentas pri la viktimoj, sed ne pri la transvivintaj esperantistoj partoprenintaj la popolliberigan batalon, kies nombro certe ankaŭ estas alta. Ankaŭ ili ĉiutage riskis sian vivon por la libereco de sia patrio. Tio konfirmas la profundan konsciencon esperantistan, la fidelecon al sia popolo kaj internaciismon ĝis la lasta konsekvenco.

Tion emfazas ankaŭ la „rememoroj de postvivintoj" pri kelkaj el ili. Laŭdinda estas ankaŭ la enmeto de la paĝoj 91 — 110 sub la titolo „El iliaj verkoj (prozo, poezio, scienca verkado), ĉefe represoj el „La Suda Stelo" el la jaroj 1939 — 1941. Tiamaniere la leganto pli profunde konatiĝas kun la personecoj de la falintoj kaj iliaj pensoj kaj ideoj, kiuj ankaŭ hodiaŭ parte ankoraŭ por nia Esperanto-movado povas esti valoraj kaj utilaj.

La postvivinto Joĵe Kozlevĉar memorskribas pri la aktivecoj de esperantistoj en la koncentrejo Dachau[1]). Tie unue li sukcesis kontakti la ankaŭ nun bone konatan aŭstran laboristan esperantiston Haiderer, kiu havis malaltan koncentrejan numeron. Ili du ankoraŭ kolektis la polan monaĥon Klimovič, la ĉeĥan pastron Pokorny, la ruson Fulda kaj aliĝis ankoraŭ la bulgaro Darev kaj la jugoslavo Vrtunski. Ili fondis Esperanto-grupon, aranĝis memortagon honore al la mortotago de d-ro L. L. Zamenhof kaj helpis sin reciproke faciligi la vivon en la koncentrejo, ja eĉ savis la vivon de Joĵe.

Tre kortuŝa por mi ankaŭ estis la kontribuo de Emilija Lapenna pri „La eta Regina", la lasta JEL-kasistino Regina Papo, kiu pereis en Auschwitz.

(resto de paĝo 3)

gresema homaro festas grandegan jubileon: la 60-jaran datrevenon de la Granda Socialisma Oktobra Revolucio. Ĉiuj homoj de bona volo en ĉiuj landoj rigardas la unuan en la historio socialisman ŝtaton, naskitan sub la signo de la Lenina Dekreto pri Paco, kiel grandan heroldon de paco. Ĝia granda konstrua rolo en la lukto por paco en la tuta mondo estas hodiaŭ agnoskita de la tuta progresema homaro.

Tre leginda estas ankaŭ la kontribuo de d-ro Peter Zlatnar „Ideoj kaj agoj de esperantistoj en Jugoslavio“. Li faris skizon pri historia analizo de la Esperanto-movado en Jugoslavio. Montras kiel la pioniroj ekplugis la unuan sulkon t. e. en la unua periodo, sekvas la dua periodo inter la unua kaj dua mondmilitoj kaj la tria periodo post la dua mondmilito. Valora historia materialo.

La libro estus rekomendinda jam nur pro tiu historia trarigardo kun analizo de konkretaj historiaj okazaĵoj.

Rudi Graetz

[1]) Represita en GDR-eldono de „Paco“ 1977.

Internaciaj aktivecoj de MEM

Monda Asembleo de Packonstruantoj (Varsovio, 6. — 11. 5. 1977)

En la okazinta en Varsovio Monda Asembleo de Packonstruantoj partoprenis 1500 delegitoj el 125 landoj kaj 50 internaciaj organizaĵoj, inter ili ankaŭ Mondpaca Esperantista Movado, reprezentita per oficiala delegitaro konsistanta el la prezidanto de MEM, N. Aleksiev, la sekretario D. Koĉvara kaj la membro de IK de MEM kaj prezidanto de Pola MEM-komisiono, Lech Kośenjak, oficiala membro de la delegitaro de Pola Packonsilantaro.

La delegitoj havis vastan eblecon fari dialogon inter si pri ĉiuj problemoj de la pacbatalo, specicale pri la senarmado. En diversaj plenkunsidoj, rondaj tabloj, forumoj, komisionoj, kontinentaj renkontiĝoj k. s. ili interŝanĝis pensojn kaj proponojn lige kun la tagordo de la asembleo.

Je la nomo de MEM niaj delegitoj vizitis multajn el tiuj forumoj de dialogado. Speciale en forumo n-ro 4 (pri kunlaborado de neregistaraj organizaĵoj) la prezidanto de MEM faris kontribuon per mallonga parolado.

(El „Pacaktivulo“ 109/1977)

Du funkciuloj de MEM en MPK

Elektiĝis kiel membroj de la Monda Packonsilantaro la prezidanto de MEM, Nikola Aleksiev el Sofio/Bulgario kaj la ĝenerala sekretario de MEM el Tours/Francio William Gilbert.

Tinka Lakova 70-jara

La konata bulgara aktivulino de MEM, Tinka Lakova, antaŭ nelonge atingis sian sepan vivjardekon. Tinka Lakova partoprenis la laboristan Esperanto-movadon kaj aktivadis en la bulgara Esperanto-movado kaj en MEM, kie ŝi estis vicprezidantino. La esperantistoj de GDR kore gratulas al la jubileulino.

Altaj honorigoj por Rudi Graetz

Okaze de sia 70-a naskiĝtago nia prezidanto Rudi Graetz ricevis altajn ŝtatajn kaj sociajn distingojn kaj honorigojn. Reprezentantoj de ministerioj, amasorganizaĵoj kaj de la Socialisma Unuecpartio de Germanio (SUG) tre kore gratulis al la jubileulo.

La prezidanto de la Ŝtatkonsilantaro de GDR kaj Ĝenerala Sekretario de SUG, *Erich Honecker*, distingis Rudi Graetz per la „Ordeno pro Patriaj Meritoj en Arĝento" aprezante la elstarajn meritojn ĉe la konstruado de la disvolvita socialisma socio kaj la fortigo de Germana Demokratia Respubliko".

En persona gratulletero al Rudi Graetz *Erich Honecker* i. a. skribis *„ . . . Ekde 1924 politike organizita, vi batalis dum la pezaj jaroj de la faŝisma diktaturo honeste kontraŭ faŝismo kaj reakcio.*

Post la liberigo de nia popolo per la glora soveta armeo vi apartenis al la aktivistoj de la unua horo, donintaj sian tutan forton kaj kapablon por la konstruado de nova vivo en nia lando. Via agado en respondecaj funkcioj de la eksterlanda komerco kontribuis al la daŭra plifortigo de nia Germana Demokratia Respubliko kaj al la kresko de ĝia internacia reputacio . . . "

La „Packonsilantaro de GDR", kies membro Rudi Graetz estas, honorigis la jubileulon per sia plej alta distingo, la germana pacmedalo „Pro meritoj por la Paco".

La prezidanto de la Packonsilantaro, *prof. d-ro Drefahl*, i. a. skribas *„Tute speciale ni volas danki al vi pro via popolamikiga agado en la Esperanto-pacmovado. Vi engaĝis vin ĉiam plenforte kaj kun entuziasmo por la konvinka prezento de nia pacpolitiko kaj per la disvastigo de niaj bonaj argumentoj helpis gajni novajn amikojn kaj kunbatalantojn por la mondpaca movado".*

Ankaŭ la Komitato de la Antifaŝistaj Rezistbatalintoj, diversebenaj partiaj estraroj kaj aliaj institucioj rekonis en siaj leteroj kaj gratuloj i. a. la gravan esperantistan agadon de la prezidanto de CLE.

Pro tio la honorigo de Rudi Graetz samtempe ankaŭ estis rekono de lia kaj de la tutrespublika esperantista agado.

*

8-a MUERO

La 7. — 9an de majo ĉi-jare en pitoreska arbara loko apud urbo Ust-Kamenogorsk (Kazaĥio, USSR) okazis tradicia printempo de esperantista junularo — la 8-a MUER (Montara Ulbinka[1]) Esperanto-Renkontiĝo). La MUER'on ĉi-jaran partoprenis dudek du anoj de E-kluboj el Barnaul, Ŝemonaiĥa kaj Ust-Kamenogorsk.

Dum tri tagoj okazis kunsidoj de la aktivuloj, ardaj sportkonkuroj kaj turistaj stafetoj, marŝoj en la montaron, konkursoj de la tradukemuloj kaj interpretistoj, ĉiuvespere lignofajro kun E-kanzonoj, ŝercoj kaj anekdotoj.

[1]) Ulbinka estas montara rivereto ĉe kies bordo okazadas la MUER'oj.

Laŭ Boris Anohin, Ust-Kamenogorsk

Lê Duân

Ĝenerala Sekretario de Vjetnama Komunista Partio

Nia hodiaŭ ordono estas jena:
„Ĉion por la produktado, por la socialisma konstruado, por la patria prosperiĝo, por la feliĉo de l'popolo."
Sampatrujanoj de la tuta lando — laboristoj, kamparanoj, intelektuloj, gejunuloj, virinoj, militistoj — vi ĉiuj transformu la revolucian heroismon en la batalo kontraŭ la usona agresinto en revolucian heroismon en la laboro! Aŭdace antaŭeniru sur la fronto de produktado, de laboro de konstruado.

(El „VPEA-Informilo 1/77)

★

Ho Chi Minh-urbo: Movado de analfabeta likvido

Ĉe la eniro de la Nova jaro, la loĝantaro de Ho Chi Minh-urbo lanĉis revolucion movadon por likvidi la analfabetecon en plej mallonga templimo.
Ĝis hodiaŭ (la 25a—2—1977), 5378 laboristoj, t. e. 63,78 % de la analfabetaj laboristoj estis alfabetigitaj. Dek-du entreprenoj likvidis centprocente la analfabetecon el inter iliaj laboristoj.
En la popolamasoj, 72184 personoj, t. e. 74 % de la analfabetoj de la tuta urbo nun scipovas legi kaj skribi.
Ĉiuj kvin ĉirkaŭurbaj distriktoj jam likvidis la analfabetecon.
Ok aliaj kvartalgrupoj aktuale donas la unuan rajton al la alfabetiga movado kun celo plenumi ĝin en marto 1977.

(laŭ „VPEA-Informilo 1/77)

★

DIPLOMLABORO DE VJETNAMA STUDENTINO

Vjetnama studentino de Moskva Ŝtata Universitato Nguyen Thi Hau Hien defendis diplomlaboron pri la movado de solidaro de japana popolo kun Vjetnamio dum la usona agresmilito, precipe pri verkoj de japanaj verkistoj kaj ĵurnalistoj je tiu temaro. En parto, koncernanta la mondan solidarmovadon kun la lukto de la vjetnama popolo, ŝi alte taksis la rolon de la tutmonda esperantistaro en tiu movado. Ŝi skribis: „Efektive estis neniu Esperantorevuo aŭ ĵurnalo de tiu tempo, kiu ne tuŝis pri Vjetnamio".
Ankaŭ ŝi skribis pri la verko de la japana verkisto Saotome Kacumoto „Betonamu no Daĉan", kiu estis tradukita en Esperanto sub la titolo „Danjo en Vjetnamio" kaj pro tio fariĝis tre konata por la esperantistoj de ĉiuj landoj.
Interese estas rimarkigi, ke Nguyen Thi Hau Hien estas la nepino de Nguyen Cong Mon (Ngujen Kong Mon), veterano de vjetnama Esperantomovado, kaj intencas daŭrigi la agadon de sia avo.

Dmitrij Perevalov, Moskvo

Esperantista agado en GDR 1976

La pasinta jaro estis karakterizita por la esperantistoj de GDR per la novelektoj de la estraroj sur subdistriktaj, distriktaj kaj respublika ebenoj. La elektaj konferencoj diskutis la agadon, sensarĝis la malnovajn estrarojn kaj elektis novajn. Krome oni elektis la delegitojn por la distriktaj konferencoj resp. la respublika II-a Centra Konferenco de la esperantistoj en GDR. Ĝenerale la vasta diskutado kaj la sekretaj elektoj ne nur spegulis la akiritajn sukcesojn sed ankaŭ kondukis al plijunigo de la gvidantaroj.

La II-an Centran Konferencon de 5-a ĝis 7-a de novembro 1976 en Leipzig partoprenis 180 delegitoj kaj 20 eksterlandaj gastoj, do entute 200 personoj. Reelektiĝis kiel prezidanto de Centra Laborrondo Esperanto Rudi Graetz kaj vicpezidantoj fariĝis Rudolf Hahlbohm kaj Ludwig Schödl. Sekretario reelektiĝis d-ro Detlev Blanke. Krom ili al la prezidio de CLE apartenas pluaj 4 membroj.

La gvidantaro de la esperantistoj de GDR nun havas 42 membrojn, inter ili la membroj de la prezidio de la Junulara Komisiono.

CLE plijuniĝis entute, sed devas plue plijuniĝi. La junulara agado, kvankam ankoraŭ modesta, pluevoluis. Oni organizis du senpagajn semajnfinajn seminariojn. Unuafoje la ĉefa ĵurnalo de la socialisma junulara organizo de GDR (Libera Germana Junularo) „Junge Welt“ publikigis ampleksan artikolon pri Esperanto. Entute en GDR aperis ĉirkaŭ 200 artikoloj en la taggazetaro, inter alie 24 artikoloj en „Der Morgen“, kiu ekde 1965 regule publikigas artikolojn kaj atingis jam la 400-an. Por la sistema pretigo de kadroj de la movado ankaŭ servis la tutsemajna 10-a seminario de honoroficaj Esperanto-funkciuloj kaj speciala seminario pri metodiko de Esperanto-instruado.

Oni devas substreki, ke dank' al la malavara financigo pere de Kulturligo tiuj seminarioj estis kiel kutime senpagaj.

Bonajn sukcesojn ĝis nun montris la koresponda kurso kun la lernolibro de Ludwig Schödl. Jam kelkaj centoj lernas laŭ tiu vojo la internacian lingvon. 1976 ankaŭ estis finpreparita nova lernolibro, kiu aperos 1978. Pasintjare aperis du numeroj de la GDR-eldono de „Paco“, la malfruiĝinta numero de 1975 kaj tiu por 1976.

Reguliĝis la aperritmo de „der esperantist“, kiu ekde 1976 estas distribuata per la poŝto. Diversaj internaciaj renkontiĝoj en la unuopaj distriktoj okazis, inter ili la trilanda renkontiĝo en majo 1976 en Görlitz kaj Zgorzelec. La Internacian Esperantistan Kampadejon Intercamping-Krossinsee ĉe Berlin partoprenis 50 esperantistoj el 7 landoj. Bedaŭrinde la vojaĝoficejo mendis por 1977 ĉiujn lokojn de la kampadejo. Pro tio ripeto de la arranĝo ĉijare ne estas ebla. En nia turismaekipe ekevoluanta lando ni do daŭrigas serĉi eblecojn por organizi internaciajn esperantistajn aranĝojn, kio ne estas tiel facila.

Realige al la kontrakto kun Pola Esperanto-Asocio la konata ĵurnalisto de Radio Varsovio, red. Jerzy Grum, faris prelegvojaĝon tra GDR prelegante pri kulturpolitiko en Pollando kaj pri la laboro de la Esperanto-

redakcio de Radio Varsovio. Daŭrigante la sciencan agadon kaj publikigante bazajn materialojn en nacilingvaj sciencaj organoj, oni sukcesis aperigi en la prestiĝa historio-scienca revuo „Beiträge zur Geschichte der Arbeiter-Bewegung“ 4/76 (Kontribuoj pri la historio de la laborista movado) ampleksan artikolon pri la laborista Esperanto-movado.

Grava por la plua scienca agado en GDR rilate al interlingvistiko kaj esperantologio sendube ankaŭ estis la doktoriĝo de Detlev Blanke, sekretario de CLE kaj sekciestro por Esperanto en Kulturligo de GDR, membro de la Internacia Komitato de MEM. Detlev Blanke verkis disertacion, en kiu li komparis problemojn de la vortfarado de germana lingvo (kiel ekzemplo de etna lingvo) kaj de Esperanto (kiel ekzemplo de planlingvo). La disertacio vekis grandan intereson en rondoj de la Humboldt-Universitato (Berlin—GDR) kaj en Akademio de Sciencoj de GDR.

La esperantistoj daŭrigis sian solidarecon por Ĉilio, por ĉiuj subpremitaj popoloj kaj por la rekonstruo de Vjetnamio kolektante monon. Por la evoluo de la internaciaj rilatoj de CLE estis grava la kolektiva membriĝo en Universala Esperanto-Asocio dum la 61-a UK en Ateno. Por la aliĝo voĉdonis 45, kontraŭ 4, sindetenis unu komitatano de UEA. Komitatano de UEA por CLE fariĝis Rudi Graetz.

4-kapa GDR-delegacio partoprenis la VII-an Ĝeneralan Konferencon de MEM, 13. julio 1976. Elektiĝis 7 MEM-anoj de GDR en la Internacian Komitaton. La Honorinsignon de MEM por elstara porpaca agado ricevis s-ino Hella Sauerbrey, d-ro Karl Schulze kaj s-ro Otto Bäßler okaze de lia 80-a naskiĝtago, la 17-an de januaro 1977.

Delegacioj de CLE partoprenis i. a. la VIII-an (en Krakovo) kaj IX-an Konsultiĝon (Moskvo) de la Esperanto-organizaĵoj de eŭropaj socialismaj landoj, la II-an kongreson de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (Praha), la XIX. kongreson de Pola Esperanto-Asocio, la 39. kongreson de Bulgara Esperanto-Asocio kaj la 26. kongreson de Hungara Esperanto-Asocio.

Entute la jaro estis sukcesa kaj fruktodona.

★

Internacia Foira Renkontiĝo

IFER '77. Unuafoje post la novkonceptado de la Esperantistaj renkontiĝoj dum la Leipzig-a printempa foiro la „Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo“ devis pruvi sian vivokapablon la 12-an de marto 1977. En ĉeesto de la soveta vic-konsulo Konstantin Ŝepetov, s-anoj Behr kaj Hamann prezentis diaporamon (son-bild-prelegon) pri la evoluo de Sovetunio, de germana-soveta amikeco kaj la parto de la esperantistoj. En scio-konkurso la partoprenantoj povis montri siajn sciojn pri Sovetunio. La soveta vic-konsulo dankis al la aranĝintoj pro la interesa kaj digna trakto de la grava temo en la jaro de la 60-a datreveno de la Granda Socialisma Oktobra Revolucio. Kiel memorigan donacon la Leipzig-a Laborrondo Esperanto transdonis al li ekzempleron de „Nuda inter lupoj“.

Ĉiuj partoprenantoj esprimis sian kontenton pri la vespero, kiu (laŭ kelkaj kritikuloj) „estis la plej bona ekde 1970“. Eĉ la (manke de volontuloj !) ne sukcesinta tria programpunkto „dancado“ ne povis renversi la supran juĝon. Restas nur esperi, ke venontjare pli ol nur 58 personoj profitos ĉi-interesan „IFER '78“.

(El „Komuna Esperanto-Informilo Leipzig/Halle 3/77)

La membroj de Centra Laborrondo Esperanto

Ni prezentas la fotojn de la membroj de Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR. Ili estis elektitaj dum la II-a Centra Konferenco de la esperantistoj en Kulturligo de GDR, la 7-an de novembro 1976 en Leipzig.

1. **Prezidanto:**
   (1) Rudi Graetz, pensiulo, komerca konsilisto, 1907
2. **Vicprezidantoj:**
   (2) Rudolf Hahlbohm, dipl. teatro-sciencisto, 1910
   (3) Ludwig Schödl, pensiulo, instruisto, 1909
3. **Sekretario:**
   (4) D-ro Detlev Blanke, sekciestro en Kulturligo, 1941
4. **Prezidianoj:**
   (5) Hans Heinel, dipl. filozofo, prez. DLE Karl-Marx-Stadt, 1925
   (6) Rita Krips, dipl. komercistino, 1953
   (7) Siegfried Linke, dipl. historiisto, prez. DLE Halle, 1938
   (8) Werner Pfennig, inĝeniero, prez. DLE Neubrandenburg, 1943
5. **Membroj:**
   (9) Otto Bäßler, pensiulo, kompostisto, 1897
   (10) D-ro Giso Brosche, veterinaro, 1938
   (11) Rudolf Burmeister, ĉarpentisto, 1930
   (12) D-ro Till Dahlenburg, fakinstruisto, 1934
   (13) Hans Diedrich, fervojista ĉefkonsilisto, prez. DLE Schwerin, 1912
   (14) Marita Dörner, oficistino, 1953
   (15) Dieter Dungert, dipl. kemi-inĝeniero, 1943
   (16) Ingrid Erfurth, univ. asistantino, 1953
   (17) Prof. D-ro Viktor Falkenhahn, pensiulo, lingvosciencisto, 1903
   (18) Werner Habicht, pensiulo, oficisto, 1909
   (19) Jürgen Hamann, bibliotekisto, prez. DLE Leipzig, 1945
   (20) Hans-Jürg Kelpin, pastoro, 1935
   (21) Linde Knöschke, inĝenierino, 1936
   (22) D-ro Erich-Dieter Krause, lingvisto, 1935
   (23) Helmut Lehmann, pedagogo, prez. DLE Frankfurt/O.
   (24) Michael Lennartz, metallaboristo, 1955
   (25) Renate Lewin, studentino, 1956
   (26) Peter Liebig, fakinstruisto, prez. DLE Cottbus, 1935
   (27) Achim Meinel, dipl. inĝeniero, 1940
   (28) Günther Peters, dipl. inĝeniero, prez. DLE Rostock, 1924
   (29) Werner Plate, dipl. ekonomo, 1913
   (30) Karl Raabe, dipl. socisciencisto, prez. DLE Gera, 1929
   (31) Walter Röhner, pensiulo, instruisto, prez. DLE Dresden, 1909
   (32) Winfried Röhrig, instruisto, prez. DLE Suhl, 1946
   (33) Günter Rosenbaum, majstro pri profesio-klerigo, prez. DLE Erfurt, 1937
   (34) D-ro Peter-Wolfgang Ruff, supera kuracisto, 1928
   (35) Hella Sauerbrey, pensiulino, instruistino, 1920
   (36) Hanna Scheffs, pensiulino, asekura komercistino, prez. DLE Potsdam, 1914
   (37) Ernst Schonert, pensiulo, financekonomo, prez. DLE Berlin, 1907
   (38) Ingrid Schödel, dipl. instruistino, 1945
   (39) D-ro Martin Schüler, dipl. matematikisto, 1937
   (40) Manfred Trenne, dipl. kemi-inĝeniero, prez. DLE Magdeburg, 1947
   (41) Erich Würker, pensiulo, dipl. inĝeniero, 1903

1

2

3

4

5

6

7

8

9

10

11

12

13

14

15

16

17

18

19

20

21

22

23

24

25

26

27

28

29

30

31

32

33

34

35

36

37

38

39

40

41

En la oficejo laboras s-inoj Ruth Schonert (1 kaj Ilse Serowy (2)

1

2

Distingoj per Johannes-R.-Becher-medalo

Dum la distriktaj delegitaj konferencoj, de KL kiujn ankaŭ aktive partoprenis la esperantistoj, ĉu per materialoj, ĉu per diskutkontribuoj, estis distingitaj diversaj esperantistaj kulturligaj funkciuloj.
Inter ili estas Jürgen Hamann el Leipzig (medalo en arĝento), Siegfried Linke el Halle (medalo en bronzo), ambaŭ estas membroj de CLE.

Gratuloj

Okaze de la 80-a naskiĝtago (4. 8. 1977) ni tre kore gratulas al la laborista esperantisto Hans Manske el Berlin.

CLE

Ilse Serowy 65jara

Ekde la unua tago en 1965, tiam nur kun kesto da aktoj subbrake, Ilse Serowy apartenas al la oficejo de CLE. Ŝi kunkonstruis ĝin. Kun multa engaĝo kaj amo por la transprenita tasko de sekretariino, ŝi travivis ĉiujn etapojn de la suprenevoluo de la esperantista agado en GDR kaj havas gravan parton en tiuj sukcesoj. La 19-an de oktobro ĉijare ŝi fariĝis 65-jara. Tre korajn gratulojn ni transdonas en la nomoj de ĉiuj esperantistoj en KL de GDR.

Centra Laborrondo

Ni kondolencas

Mortis la 18. 9. 77 *Willy Weißbach* el Einsidel. Ni perdis eminentan laboristan esperantiston kaj kamaradon.

En Stralsund forpasis la 14. 9. 77 *Georg Eckert* en sia 72-a vivojaro. Li apartenis al la senlaculoj. Al la postrestintoj de la forpasintoj CLE sincere kondolencas kaj tenos vivaj la memorojn.

CLE

Ĝenerala Direktoro de UNESCO antaŭ esperantistoj

La 62-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de 30-a de julio ĝis 6-a de aŭgusto 1977 en Reykjavik/Islando estis grandega sukceso. 1200 esperantistoj el 50 landoj, inter ili Rudi Graetz kaj d-ro Detlev Blanke el GDR, povis travivi veran sensacion: la Ĝenerala Direktoro de UNESCO, s-ro Amadou-Mahtar M'Bow, persone ĉeestis la inaŭguron kaj faris tre gravan paroladon. Evento nur komparebla kun la fama rezolucio de UNESCO favore al Esperanto el la jaro 1954.

En „der esperantist" 6/77 ni amplekse raportos pri la kongreso.

★

Komuninko de Hungara Esperanto-Asocio

La Estrarelekta Jarkunsido de Hungara Esperanto-Asocio okazis la 26-27an de marto. En la ĉeesto de ĉ. 110 delegitoj, 70 komitatanoj kaj ĉ. 60 gastoj el kiuj aparte menciindaj estas reprezentantoj-gvidantoj de neesperantistaj hungaraj ŝtataj kaj sociaj organizaĵoj kaj la delegacioj de la najbaraj amikaj E-organizaĵoj oni pridiskutis la 85paĝan raporton pri aktivado en la pasinta kvarjara periodo, akceptis decidojn pri farendaĵoj en 1977 kaj por la sekvaj kvin jaroj. Pro sia movada agado la Landa Konsilantaro de Hungaraj Sindikatoj distingis per honorinsigno 7 niajn plej aktivajn membrojn.

En ĉi tiu kunsido estis elektitaj kvar honoraj prezidantoj de la Asocio, 75 membroj de Landa Komitato, 19 membroj de la Prezidantaro. Prezidanto fariĝis d-ro Ferenc Nezvál, pensiita justicministro kaj ĉefsekretario denove s-ro Imre Kutas, pensiita ambasadoro. Ĉiuj membroj de Landa Komitato kaj de Prezidantaro estas aktivaj esperantistoj farintaj multon por Esperanto en sia agado, plejparto el ili estas konataj ankaŭ en la publika, socia vivo, ekz. 2 membroj de la Prezidantaro kaj 3 de la Landa Komitato estas membroj de Hungara Parlamento.

Ni esperas, ke per renovigita gvidantaro kaj kunlabore kun la amikaj Esperanto-organizaĵoj ni povos atingi pliajn rezultojn por atingi niajn porpacajn esperantiste internaciismajn celojn.

T. Vasko

★

Junulara seminario en Szolnok

De 19-a ĝis 24-a de junio 1977 ĉe Szolnok okazis seminario de junaj esperantistaj aktivuloj el Bulgario, ČSSR, GDR kaj Hungario.

Ili interŝanĝis spertojn pri la junulara agado. El GDR Michael Lennartz, membro de CLE, reprezentis la Estraron de la Junulara Komisiono de CLE.

★

1926 en Leningrad!

Bv. korekti en „de" n-ro 3/77, p. 1. La kongreso okazis 1926 en Leningrad, kaj ne 1924.

LA GAZETARO PRI NI EN 1976

Ni listigas la ricevitajn gazeteltrancĉojn el la jaro 1976. Eble iu sin demandas pri la utilo de tia listigo. Laŭ nia opinio ni pruvas per tia superrigardo, ke sukcesa gazetara laboro estas tute ebla kaj funkcias en la unuopaj distriktoj kun tre malsama sukceso. Krome la estontaj historiistoj de la Esperanto-movado en GDR pli facile povas formi unuecan bildon el la multaj mozaikŝtonaj informoj dissemitaj tra la loka, regiona kaj tutrespublika gazetaro.

La pergazetara informa agado en la jaro 1976 ne povas kontentigi. Tro grandaj estas la diferencoj inter la unuopaj distriktoj. Iuj distriktoj tute mankas. Ĉu la fakto, ke ili ne sendis pruvekzemplerojn al CLE, signifas, ke oni nenion publikigis pri Esperanto? Ankaŭ la fabrikaj gazetoj tro malofte estis utiligitaj. La spertoj tre klare montras, ke ĉiam tie oni multon publikigas,

a) kie la esperantistoj povas prezenti interesajn faktojn kaj
b) kie troviĝas kapablaj artikolantoj ligantaj la kontakton al la gazetaro.

Nepre necesas konsiderinde pli ofte kaj pli bone informi la lokan, distriktan kaj entreprenan gazetaron. Ne havas sencon nur daŭre postuli de CLE ke ĝi publikigu en centraj gazetoj. Kompreneble ofte estas multe pli facile atingi la regionajn organojn ol la respublikajn. Do jen la superrigardo por 1976:

1. **Tutrespublikaj organoj**
   - „Neues Deutschland", Berlin, SED, 8. 8. 76, 30-linia artikolo pri la 61-a UK en Ateno, pri UEA kaj la aliĝo de CLE al UEA; en la eldono de 11. 6. 76 (Berlin) longa artikolo pri Volapük kaj aliaj planlingvaj projektoj („La praavo lernis Volapük)
   - „Berliner Zeitung", Berlin, SED, 10. 8. 76, informo pri aliĝo de CLE al UEA
   - „Horizont", Berlin, Nr. 28/1976, pri la „insulo Esperanto" en Bulgario (ĉe la urbo Orjahovo)
   - „Der Morgen", Berlin, LDPD, 2. 3. 76, letero pri la serio de Peter Levsen; 3. 3. 76 anonco de kursoj en Berlin; 26. 5. 76 pri IREN en Abaliget/Hungario; 7..7. 76 letero de W. Habicht pri laborista sporto kaj Esperanto; 12. 7. 76 pri la 39-a kongreso de Bulgara Esperanto-Asocio en Ruse. (Vidu krome la artikolon „La serio de Peter Levsen en ‚Der Morgen' 1976")

2. **Fabrikaj gazetoj**

   Malabunda estas la rikolto:
   - „Der Röhrenwerker", Röhrenwerk Mühlhausen, 2 + 4/1976, grandegaj artikoloj pri Esperanto (dulingvaj)
   - „Werftstimme", Warnowwerft Rostock, 5/1976, letero el Francio pri la situacio de la franca laboristaro (poŝtaĵo al la Esperanto-grupo)
   - „Gummiwerker", Waltershausen, 19. 8. 76 pri kursoj
   - „Der Schmiedewerker", Roßwein, 13/1976, Salutoj el USSR
   - „Neuer Mertik-Regler", Quedlinburg, 16/1976, pri kurso.

3. **Distrikta kaj loka gazetaro**

3.1. **Distrikto Schwerin**
   - „Norddeutsche Zeitung", NDPD, Schwerin, 2. 6. 76, pri distrikta kunveno en Neubrandenburg kun polaj gastoj; 15. 9. 76 ampleksa artikolo pri Esperanto

– „Der Demokrat“, Schwerin, CDU, 10.1.76 granda anonco pri koresponda kurso; 26.1.76 42 salutoj el 14 landoj; 3.11.76 ampleksa artikolo pri la ŝancoj de Esperanto
– „Schweriner Volkszeitung“, Schwerin, SED, 27.1.76, pri la kluba agado 10-jara en Schwerin

3.2. **Rostock**
– „Ostseezeitung“, Rostock, SED, 13.6.76 pri la 39-a kongreso de Bulgara Esperanto-Asocio; 19.10.76 pri novaj kursoj
– „Norddeutsche Neueste Nachrichten“, Rostock, NDPD, 8.10.76 pri novaj kursoj

3.3. **Neubrandenburg**
– „Freie Erde“, Neubrandenburg, SED, 12.11.76 pri kurso
– „Freie Erde“, Templin, SED, 4.6.76 pri rilatoj al polaj esperantistoj el Koszalin
– „Norddeutsche Neueste Nachrichten“, Neubrandenburg, NDPD, artikolo pri Esperanto (per Esperanto por Mondpaco); 9.11.76 „Kie situas la Insulo Esperanto ?

3.4. **Potsdam**
– „Märkische Volksstimme“, Potsdam, SED, 6.11.76 pri la II-a CLE-Konferenco
– „Märkische Volksstimme“, Neuruppin, 7. + 8.9.76, Esperanto en Popola Altlernejo
– „Märkische Volksstimme“, Rathenow, 19.6.76, esperantistoj pri la IX-a partia kongreso
– „Märkische Union“, Potsdam, CDU, 4.7.76, 80 esperantistoj renkontiĝis en Potsdam, i.a. kun gastoj el USSR kaj Pollando
– „Brandenburgische Neueste Nachrichten“, Potsdam, NDPD, 9.7.76, gastoj el Moskvo kaj Opole en Potsdam.

3.5. **Magdeburg**
– „Mitteldeutsche Zeitung“, Magdeburg, NDPD, 15.7.76 pri esperantista delegitaro el Magdeburg en Bulgario (Ŝumen); 9./10.10.1976, amplekse pri Esperanto (la pseŭdonimo mondkonatiĝis).

3.6. **Frankfurt/Oder**
– „Neuer Tag“, Bernau, SED, 26.6.76, pri prelego (Esperanto estas pli ol nur lingvo); 22.10.76 pri kursoj;
– „Neuer Tag“, Frankfurt/Oder, SED, 23.12.76, grandega anonco pri koresponda kurso (Esperanto — la Internacia Lingvo ! Nun ankaŭ lernebla per koresponda kurso. Sekvas informoj pri Esperanto. Interesuloj sin turnu al . . .)

3.7. **Halle**
– „Freiheit“, Quedlinburg, SED, 26.8.76, „Esperanto en Quedlinburg“, i. a. pri UEA-aliĝo de CLE
– „Liberaldemokratische Zeitung“, Quedlinburg, NDPD, 24. 8. 76, pri kursoj + informoj pri Esperanto
– „Liberaldemokratische Zeitung“, Halle, NDPD, 20.12.76, distrikta renkontiĝo (Esperantistoj estas solidaraj)

3.8. **Cottbus**
– „Lausitzer Rundschau“, Finsterwalde, SED, 11.9.76, pri CLE-aliĝo al UEA kaj aliaj ampleksaj informoj
– „Lausitzer Rundschau“, Cottbus, SED, 16.11.76, pri la II-a CLE-Konferenco; 26.8.76, pri Esperanto-agado en KL (Carl-Blechen-Club)

3.9. **Erfurt**

- „Thüringer Neueste Nachrichten", Erfurt, NDPD, 8. 9. 76, pri kursoj; 9. 11. 76, „Kie situas la Insulo Esperanto ?"
- „Thüringische Landeszeitung", Erfurt, SED, 31. 8. 76, amplekse pri esperantista agado; 18. 8. 76, granda artikolo pri Esperanto.

3.10. **Karl-Marx-Stadt**

- „Freie Presse", Schwarzenberg, SED, 2. 10. 76, pri la 10-jara agado de la loka grupo; 3. 11. 76, kursoj en la urbo

3.11. **Leipzig**

- „Leipziger Volkszeitung", Leipzig, SED, 8. 8. 76, pri aliĝo de CLE al UEA; 5. 11. 76 amplekse pri la II-a CLE-Konferenco.
- „Mitteldeutsche Neueste Nachrichten", Leipzig, NDPD, 8. 11. 76, „Kie situas la Insulo Esperanto ?"

3.12. **Dresden**

- „Sächsische Zeitung", Zittau, SED, 17. 3. 76, „Sciinda por lingvo-amikoj" (amplekse pri Esperanto); 6./7. 11. 76, tre amplekse pri la grupo „Triangulo" de Zittau
- „Sächsisches Tageblatt, Dresden, NDPD, 12. 3. 76, „Viva lingvo" (parte Esperante); 28. 5. 76, „Faust en Esperanto" (literaturo en Esperanto).

Ĉiu Distrikta Laborrondo vidos la nesufiĉecon de la gazetara laboro. Komplete mankas la distriktoj Suhl kaj Gera. Berlin enestas en rubriko 1. Feliĉe jam nun oni povas prognozi pli altan viglecon por 1977. La jubilea jaro de Esperanto estu vaste utiligata.

„Der Morgen" 1976

En „Der Morgen" (La Mateno) 1976 aperis jenaj kontribuoj de Peter Levsen:

2. 1.: Atingoj de la GDR-movado 1975
23. 1.: Konversacio
6. 2.: Esperanto kiel pontlingvo
20. 2.: Lingva temo
12. 3.: Hungara Vivo
27. 3.: Lingva temo
14. 4.: VIII-a Konsultiĝo de socialismaj landoj
30. 4.: Lingva temo
14. 5.: Soveta libro „Problemoj de interlingvistiko"
28. 5.: Kalman' Kalocsay
11. 6.: Heine en Esperanto
27. 6.: Esperanto kaj sporto
23. 7.: Disertacio pri Esperanto
6. 8.: Lingva temo
20. 8.: Centra Laborrondo Esperanto aliĝis al UEA
3. 9.: Interlingvistikaj terminoj
24. 9.: GDR-eldono de „Paco" 1976
8. 10.: Terminoj de la IX-a Partikongreso
22. 10.: Esperanto kaj astronomio
12. 11.: II-a Konferenco de CLE
19. 11.: II-a Konferenco
3. 12.: Evoluo de Esperanto
18./19. 12.: Esperanto en Sovetunio

Kiel videblas, la serio de Levsen prezentas buntan spektron de interesaj temoj. Ĉiuj aktivuloj de GDR devas sekvi la kontribuojn.

Junularo el 4 landoj renkontiĝis

Ekde la 9. — 13. 2. 77 renkontiĝis en Nidzica/Pollando 50 junaj esperantistoj okaze de internacia seminario kun la temo „Esperanto en la servo por la junularo". La seminarion organizis la Pola Studenta Esperanto-Komisiono (PSEK), kiu laboras kadre de la Socialisma Asocio de Polaj Studentoj (SAPS).
Inter la 50 partoprenantoj troviĝis 9 gastoj el Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj GDR. La junularan Esperanto-movadon de GDR reprezentis *Renate Schütt* kaj *Rita Krips,* ambaŭ membroj de la junulara komisiono ĉe la Centra Laborrondo.
Ni partoprenis la seminarion pere de prelegoj resp. diskutkontribuoj pri la ĉeftemo aŭ aliaj subtenoj, ekz. pri la demando *„Kamaniere Esperanto povas realigi la individuajn kaj sociajn celojn de la junularo"*. La diskuto baziĝis ĉefe sur la pli malpli riĉaj spertoj de la partoprenantaro. Dum la seminario ankaŭ okazis konkurso sub la ĉeftemo, post kio la plej bonaj kontribuoj estis premiitaj.
La tutan seminarion oni surbendigis helpe de reprezentanto de studenta radiostacio, kiu ankaŭ intervjuis la gvidantojn de la eksterlandaj delegacioj.
Ni okupiĝis pri larĝa spertinterŝanĝo pri la eblecoj aktivigi la junularajn movadojn en niaj landoj kaj samtempe pliaktivigi la kunlaboron inter ili pere de novaj metodoj.
Ne eblas ja raporti pri ĉiuj eroj de la programo. Nur nepre indas mencii, ke krom la diskutoj la junaj esperantistoj ricevis ege multe da informoj pri la Esperanto-movado en la socialismaj landoj (pro la prelegoj de la diversaj reprezentantoj) kaj pri la movado mondskale (pro la prelegoj ekz. pri UEA, TEJO, MEM, SAT).
La bonan kaj amikan etoson subtenis la ĉiuvesperaj dancadoj kaj la aliaj distraj programeroj, tiel ke la tuta seminario certe restos neforgesebla por ni ĉiuj!

R. Krips

★

Somera ski-slalomo

Dum bela kaj suna vetero okazis la tradicia „ĉokolada slalomo" kiu finis la ski-sezonon en la Karkonoŝa montaro la 12. 6. 1977. Somerskiistoj ski-batalis en naĝaj vestoj !
En la ĝenerala klasifiko venkis Janusz Januszewski (Cerva Monto). En la gruparo de ski-instruistoj la plej sukcesa estis Ewaryst Roŝkieviĉz (IESSK) el Szklarska Poreba, en la amatora gruparo venkis Lutz Brodsky el Hirschfelde (Germana Demokratia Respubliko). En gruparo de nestoroj venkis la 53-jara Walter Brodsky (ISG Hirschfelde, GDR). La sportistoj el Szklarska Poreba esperas, ke venontjare partoprenos pli da sportistoj el GDR.

D-ro Janusz Januszewski
Internacia Esperanta Somera-Ski-Klubo
Szklarska Poreba (Polio)

Seminarioj 1976/1977

Lastatempe okazis denove diversaj seminaroj, kiuj celis plibonigi la gvidagadon kaj fakan nivelon de la esperantistoj.
De 8. — 11. 12. 1976 en Bad Saarow okazis la tria metodika seminario, kiun gvidis d-ro Till Dahlenburg antaŭ pli ol 30 kursgvidantoj.
En Altenhof (ĉe Werbellinlago) okazis de 31. 1. — 4. 2. 1977 la 11a seminario por kursgvidantoj. Ĝi traktis problemojn de la aktuala politiko (Hans Heinel) ĝis la grava temo de argumentado kaj informado pri Esperanto (d-ro D. Blanke). Ĝin partoprenis 32 esperantistoj.
La junularo renkontiĝis de 21. — 25. 3. 1977 same en Altenhof. Ĝin partoprenis 22 gejunuloj. (Vidu la apudan foton kaj la raporton en „de“ 3/77 p. 21).

„Bydgoszcz 77“

De la 3-a ĝis la 5-a de junio 1977 la Fako pri Kulturo kaj Arto de la Urba Oficejo en Bydgoszcz kaj Pola Esperanto Asocio kune kun la Junulara Turisma Centro „Juventur“ okazigis „Internacian Esperanto-Renkontiĝon“ kadre de la „Tagoj de Bydgoszcz 77“.
La aranĝo estis interesa provo, kombini nacian kulturan aranĝon — dediĉita al folkloro — kun internacia E-renkontiĝo, kiun partoprenis ĉ. 300 esperantistoj el 9 landoj.
Okazis „Internacia Vespero de Amikeco“, renkontiĝo de esperantistoj fervojistoj, koncertoj, sportaj prezentaĵoj kaj dancoj de polaj folklorensembloj. Per florkrono kaj memorigaj vortoj oni omaĝis la pereintojn de la dua mondmilito ĉe la Monumento de Batalo kaj Martireco. Dum tuta posttagmezo oni povis rigardi la folklorensemblojn el Bulgario, Hungario kaj Ĉeĥoslovakio.
„Varia Esperanto-Vespero“ en la Palaco de Junularo ĝojigis la partoprenintojn per varia, altnivela programo, lerte kaj ĉarme anoncata de pola esperantistino.
La lasta tago estis dediĉita al Internacia Esperanto Seminario pri „Rolo de kultura aktivado por la disvastigo de Esperanto“, lige kun konkurso kaj premioj. Mi havis la bonŝancon, akiri la trian premion, t. e. senpaga, 14-taga partopreno en Internacia Esperanto-Kurso por instruistoj.
Finiĝis la tagoj de Bydgoszcz per renkontiĝoj de la ĉefaj estraroj de HEA kaj PEA, seminarioj de Esperanto-ĉiĉeronoj en Turisma Centro de PEA kaj por polaj E-instruistoj.

H. Sauerbrey

Tridistrikta renkontiĝo

Laŭ propono de la estraroj de la tri nordaj distriktoj Neubrandenburg, Rostock kaj Schwerin la unua komuna tridistrikta renkontiĝo okazis la 15an de majo 1977 en la histoririĉa urbo Güstrow. El ĉiu distrikto alvenis 15 ligo-amikoj.

Laŭprograme nia sekretario de CLE D-ro Detlev Blanke faris paroladon pri la temo „Aktualaj problemoj de la evoluo de la Esperanto-movado en GDR". Krome li lumbildprelegis pri Ateno kaj la 61a UEA-kongreso. Ambaŭ prelegojn la partoprenantoj entuziasme akceptis.

Post la prelegoj la infana kulturgrupo el Rostock sub la lerta gvidado de la ligoamikino Schröter prezentis tre agrablan kantprogramon. Ili prezentis laboristajn, folklorajn kaj internaciajn kantojn en germana, platgermana, hispana kaj Esperanta lingvoj. Post la komuna tagmanĝo restis ankoraŭ sufiĉe da tempo por viziti kelkajn historiajn vidindaĵojn en la urbo. Krom la renovigita kastelo, la malnova katedralo kaj la Ernst Barlach muzeo oni ankaŭ povis rigardi la urban muzeon kun la historia „standardo de Krasny Sulin"[1]). Ĝi estis donaco de la laboristoj el la metalfabriko de tiu ĉi urbo. Por ĝi iamaj laboristoj-esperantistoj de Mecklenburg organizis antaŭ la faŝista tempo konkurson kun la sovetaj amikoj.

La ĉeestantoj esprimis la deziron, ke ankaŭ en la venontaj jaroj okazu similaj kunvenoj inter la tri nordaj distriktoj. La renkontiĝo 1978 okazos en la distrikto Neubrandenburg.

Hans Diedrich

[1]) kp. „der esperantist" 3/75, p. 4

Helpanto dum Intertraktado

Je la 16-a de majo 1977 en „Muzeo por Popolarto" Dresden GDR okazis intertraktado pro kontrakto farota inter la direkcio de la „Muzeo por Etnografio" en Torun Pollando kaj de la „Muzeo por Popolarto" en Dresden. Sinjorino Teresa Nemere reprezentantino de la toruna muzeo intertraktadis kun sinjoro doktoro Johannes Just direktoro de la dresdena muzeo. Ĉefe temis pri ekspozicio de popolartaj objektoj el la dresdena muzeo okazonta venontjare en Torun kaj poste en Varsovio. Ĉar unu partnero ne scipovis la gepatran lingvon de la alia, la intertraktado ne povis rekte okazi pollingve aŭ germanlingve. Sinjorino Nemere estas perfekta esperantistino. Tiel ŝi diris ĉion en flua Esperanto. Kiel tradukanto (interpretanto) germanlingven aŭ inverse esperantlingven funkciis Erich Wald komisiita de la dresdena Esperantogrupo en la Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko. Direktoro Doktoro Just kaj aliaj oficistoj de la dresdena muzeo konvinkiĝis pri la praktika valoro de la internacia lingvo Esperanto kaj laŭdis ties belsonecon. Tiu praktika aplikado de Esperanto postlasis bonefikan propagandon.

Erich Wald

Salutoj de amikoj

La redakcio de „der esperantist" ricevis salutleteron de la 18-a Baltlanda Esperanto-Tendaro (julio 77), kiun partoprenis 200 personoj el 11 sovetiaj respublikoj. La letero estis subskribita de 66 esperantistoj. Koran dankon, karaj amikoj!

La redakcio

Diploma disertacio pri interlingvistika problemo

Tre laŭdindaj estas tiuj studentoj de filologiaj fakultatoj, kiuj verkas sian ŝtatekzamenan aŭ diploman tezon pri iu interlingvistika aŭ esperantologia temo. Bedaŭrinde oni ofte ne ekscias pri tiaj faktoj. *Fraŭlino Véra Baranovska* el Opava verkis 1975 108-paĝan diploman disertacion pri la temo:

„Návrhy J. A. Komenského na mezinárodni jazyk“

(Proponoj de J. A. Komenský pri internacia lingvo), 108 paĝoj. Fako: klasika filologio, filozofia fakultato, Univ. de J. E. Purkyně en Brno.

Konsultanta profesoro: Prof. Dr. phil. Ant. Bartořek.

Ni kore gratulas kaj esperas, ke la juna filologino plue okupiĝos pri interlingvistikaj problemoj.

*

Grava artikolo en „Scienca Revuo“ 2/77

Kiel ni eksciis, en ĉiuj eldonoj de „Scienca Revuo“ 2/77 aperis ampleksa artikolo de prof. Peevski pri la scienco kaj la lingva problemo. La angla kaj germana eldonoj estas en GDR haveblaj ĉe la poŝto. Mendojn por la Esperanta eldono akceptas Centra Laborrondo.

*

Gratulon por la 50-a

La organo de Japana Pacdefenda Esperantista Asocio (sekcio de MEM), „Verda Kolombo“, atingis sian 50an numeron.

Pro tio la MEM sekcio de GDR tre kore gratulas al JPEA. Sur la paĝoj de „Verda Kolombo“ oni ofte trovas tre interesajn informojn pri la japana pacmovado, pri la agado de la MEM-sekcio kaj ankaŭ, cetere, pri GDR. Ni deziras al „Verda Kolombo“ pluan bonfarton kaj stabilan estontecon.

*

Libreto de N. Aleksiev

La konata funkciulo de la bulgara sindikata kaj esperanta movadoj, prezidanto de MEM, Nikola Aleksiev, apartenas al la elstaraj ĵuralistoj de Bulgario.

En la jaro 1977 la eldonejo „Profizdat“ eldonis serion da artikoloj de Nikola Aleksiev sub la temo „En la vico de la klaso“. En ĝi du ĉapitroj rilatas al la laborista Esperanto-movado „Rimarkinda persono“, p. 81-83 kaj „La gazeto Meždunaroden rabselkor“, p. 112-115.

BUCHBESTELLUNG

Der Zentrale Arbeitskreis bietet folgende Bücher an:

Karel Čapek, „Libro de Apokrifoj“ Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Praha	M 4,90
Peter Bezruĉ, „Sileziaj kantoj“, Praha	M 1,—
Fr. R. Kreutzwald, „Kalevipoeg“ „Eesti Raamat“, Tallinn, 1975	M 1,50
A. H. Tammsaare, „La mastro de Korboja“ „Eesti Raamat“, Tallinn 1976	M 2,—
Vo Nguyen Giap, „Neforgeseblaj tagoj, Hanoi 1975	M 2,—
Etnografiaj Donitaĵoj, Fremdlingva Eldonejo, Hanojo 1974	M 2,—
Poŝatlaso de la mondo, über 80 vielfarbige Karten, viele Tabellen, Register usw., Praha	M 12,60
W. Auld, „Paŝoj al plena posedo“ Progresiga legolibro de Esperanto kun lingvaj ekzercoj, Bruxelles-Praha 1974	M 7,80
E. Krusten, „Okupacio“ Dramplena rakonto, Tallinn 1972	M 1,20
Skizoj pri la usona novkoloniismo I, II, III Hanojo 1972 por kajero	M 1,50
A. Pettyn, „Esperanto laŭ amuz-metodo, Varsovio 50 p.	M 4,05
K. Kalocsay, Streĉita Kordo, eldonis Hungara Esperanto-Asocio	M 3,—
F. Szilágyi, „Koko krias jam“, Dua eldono Hungara Esperanto Asocio 1976	M 15,—
H. Göhl, Ausführliche Sprachlehre des Esperanto, Berlin 1973, 293 p. necesa por ĉiu germana esperantisto	M 6,—
B. Apitz, „Nuda inter Lupoj“	M 12,—

Porto wird zusätzlich berechnet.

★

Haveblaj ĉe CLE

— poŝtkartoj kun koverto kun surskribo „60 jaroj ruĝa oktobro“, ruĝa klišo prezentanta stelon, en kiu estas 1977, kaj Marx kaj Lenin
— poŝtkartoj kun koverto kun surskribo 90 jaroj Esperanto, 1887 — 1977, verda klišo montranta la terglobon kun Esperanta stelo.

La poŝtkartoj kaj la kovertoj portas la samajn klišojn.

Poŝtkarto kostas —,08 pf., koverto —,05 pf., glumarkoj —,03 pf.

★

Novaj insignoj aperis

Finfine CLE disponas pri novaj insignoj. Ili havas diametron de 16 mm kaj estas livereblaj kiel pingloj aŭ broŝoj.

La insigno montras verdan stelon kun ora kadro kaj ora surskribo 'Kulturligo GDR' .La tuta insigno estas kovrita per travidebla plastajo. Peco kostas M 2,—. Mendu ĉe CLE.

KRUCVORTENIGMO



de Adolf Ŝtanura

Horizontale: 1. Ejo por provlaboroj (kemio i. a.), 7. kvante granda, 9. ĉefa vejno, 11. malhumile fiera, 13. en bona aranĝo, 15. konformiĝi je tio, kion alia persono ordonas aŭ malpermesas (imperativo), 17. prepozicio, 19. nocio el la elektro, 21. sekso de ino, 23. naĝbirdo (R), 24. la akvo faras ĝin ĉe varmiĝo de 100 gradoj (infinitivo), 25. ekstrema flanko de armeo; parto de konstruaĵo, 26. pikanta manĝaĵo (R), 27. faŝisma regadmaniero (R) — **Vertikale:** 1. Ilumina lanterno, 2. dancaranĝo, 3. retroaktivi (R), 4. montra adjektivo (pluralo), 5. kampara (neologismo), 6. facile uzebla, 8. pli ol necese (adjektivo), 10. fluida graso, 12. verdejo en la dezerto, 14. perei per sufokiĝo en la akvo (R), 16. resendi helan lumon (R), 17. tropika vento (R), 18. ebenigi resp. glatigi lignon aŭ metalon (R), 20. kontraŭa, 22. interliga bolto. (R) = radiko

---

Malpermesitaj blasfemoj

Tre drastaj blasfemoj enŝteliĝis en la ĉiutagan lingvaĵon de Bernhard Shaw. Lia edzino pro tio ĉagreniĝis kaj provis dekutimigi lin de la blasfemado. Pli longa malsano de sia edzo helpis ŝin. Post resaniĝo, reveninte de iu bicikla ekskurso, li entuziasme diris al sia edzino:

— „Nur nun mi scias, kio fakte estas blasfemoj !“

Lia edzino lamentis: „Kaj dum via malsano vi tiel bone dekutimiĝis de blasfemado . . . !“

Shaw interrompis ŝin:

— „Mi ja tute ne blasfemas! Blasfemis tiuj homoj, kiujn mi renversis veturante!“

Trad. H. Buth

★

Per birda voĉo

En loka parto de gazeto en Utrecht (Nederlando) aperis la sekva anonco: „Mi petas rehavigi al mi mian forflugintan papagon! Li estas nepre distingebla. Se vi vokas lin ‚Karulo' li kutimas respondi ‘Kun tiu sensencaĵo lasu min en paco!“

[redacted]

[redacted]

Ervin Blažiček, **901 01 Malacky,** Štúrova 1520, dez. kor. tutmonde k. spertaj samideanoj

[redacted]

Flegistino, 52-j., dez. kor. tutmonde pri literaturo, folkloro, historio, turismo, fotado, kol. pk.: Sigrid-Irmgard Schieling, **18 Brandenburg,** Potsdamer Landstr. 4

[redacted]

Lernantino, 16j., dez. kor. k. gejunuloj el GDR, kol. diskojn, bk, pm.: Edit Bicskei, **1091 Budapest,** IX. Ker. Üllöi ut. 161, I. LH, 1. Em. 8.
13j. lernantino dez. kor.: Erika Dézsi, **Gyula,** Tiborc u. 14
Junulo, 22j., dez. kor k. junulino el GDR: Géza Mester, **7624 Pécs,** Attila u. 19
Lernantino dez. kor. k. lernantino el GDR: Erzsébet Pazdernik, Magyarország, **Budapest 1061,** VI. ker. Nèpköztársasàg u. 34
Soldato Jozefo Oltványi, **2891 Tata 20/F,** dez. kor. k. 20 — 24 jaraĝuloj el GDR, interesiĝas pri moderna muziko, arto, politiko. Germanan korespondantinon en aĝo de 12 — 13 j. serĉas Eva Rácz, **4141 Furta,** Pacsirta u. 18

[redacted]

Malnova E-isto dez kor. tutmonde pri ĉ. t.: Raúl Juárez Sedeno, Apartado 180, **Camagüey**
Junulo dez. kor. k. gejunuloj el GDR: M. Robert Garcia, Ave de los Pionos 112, apto. 1, **Los Pinos/La Habana**

[redacted]

Dudekjara Puertorikano dez. kor. Hugo Rodriguez Ramirez, Apartado 22915 — U. P. R. San Juan, **Puerto Rico,** 00931

[redacted]

Gejunuloj 10 — 16j., dez. kor. tutmonde, skribu al: Czesław Bassara, ul. Dworcowa 138, **43-211 Piasek**

Teknikisto de ŝipkonstruado, 38j., dez. kor. kol. bk: Wieslaw Beyrowski, pk. 37, **84-300 Lebork**
Maria Czopek, **Krokow,** str. Teligi 20/57, Novy Prokocim, dez. kor. tutmonde pri literaturo, muziko, turismo (21j.)
Maria Gos, **78-311 Rusinowo,** 20j., dez. kor. k. gejunuloj pri sporto, muziko
Krystyna Grzesiak, **63-600 Kepno,** ul. Poznanska 41, dez. kor. k. geamikoj el GDR pri turismo, literaturo, muziko
Inĝeniero, 29j., dez. kor. k. geamikoj el GDR pri alpismo, vojaĝoj, kol. libroj n, diskojn, pm: Zygmunt Horodyski, **04-396 Warszawa,** Dwernickiego 27/m 76
Teknikisto, 32j., dez. kor. k. esp. el GDR pri sporto, turismo, kol. pm: Jan Kozuch, ul. Nowowiejska 22/96, **25-532 Kielce**
Sistema kolektantino dez. interŝ. E-revuojn k. librojn: Emilia Wojtakowska, PO-kesto 312, **50-950 Wroclaw 2**

[redacted]

Nejuna inĝeniero dez. kor. tutmonde, kol. bk, pm: Vadim Gruŝĉinski, Ab. ja. 9, **327 029 Nikolajev**
Junulo, 15j. dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk, pm: Andreo Horev, **700125 Taŝkent 125,** Visokovoltnij masiv, ul. Sajfulina 4
Lernantinoj-komencantinoj, 17—20j., dez. kor. tutmonde individue aŭ kolektive, kol. bk: Kergetööstuse Tehnikum, „Esperanto", **200001 Tallinn-1,** A. Lauteri 3, Estonio
Lernanto, 11j. dez. kor., kol. bk, pm, alumetetikedojn, kalendaretojn: Dajnjus Kirvela, **232043 Vilnius 43,** Arhitektu 6—21, Estonio
Gekomencantoj de Krasnojarska Esp.-Klubo dez. kor. tutmonde: Danilin Igorj (gvidanto de Esp.-sekcio) **660113 Krasnojarsk,** ul. Karbiŝeva 10, „A"—77

Herausgeber: Kulturbund der DDR (Zentraler Arbeitskreis Esperanto).
Redaktion: 108 Berlin, Charlottenstr. 60.
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudi Graetz, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. - Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. - Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckwerkstätte Glauchau
Artikel-Nr. (EDV) 7928 III-12-8 662